


Kirsch János:

**MARIA KAJ MARTA: ORA ET LABORA**

**(Medito en Esperanto)**

*„Kaj dum ili vojaghis, li eniris en unu vilaghon; kaj virino, nomata Marta, akceptis lin en sian domon. Kaj shi havis fratinon, nomatan Maria, kaj chi tiu sidis apud la piedoj de la Sinjoro, kaj aúskultis lian parolon. Sed Marta estis distrata pro multo da servado; kaj shi alproksimighis, kaj diris: Sinjoro, chu vi ne zorgas pri tio, ke mia fratino lasis al mi servi sola? diru do al shi, ke shi min helpu. Sed la Sinjoro respondis kaj diris al shi: Marta, Marta, vi zorgas kaj klopodas pri multaj aferoj; sed unu afero estas necesa; kaj Maria elektis la bonan parton, kiu ne estos prenita for de shi." (Luko 10,38-42)*

Karaj Gefratoj! Ni bone konas la praan devizon de la Benedikta Ordeno: Ora et labora! – Preghu kaj laboru! Tiu devizo koncize esprimas la chefajn taskojn de chiu kristano. Nia vivo havas ja du flankojn: aktivado kaj kontemplado, diakonio kaj meditado, agado kaj fidado, servo kaj pregho. Tiujn du flankojn simbolas la evangeliaj roloj de Maria kaj Marta. Ambaú flankoj estas gravaj, ambaú estas bezonataj. Kaj estas nepre necesa – precipe en nia trosharghita vivo! – ankaú ilia ekvilibro. Tiun ekvilibron mirinde montras la ekzemplo de ***Patrino Tereza el Kalikato.*** Shi aktivadis preskaú superhome por la bono de malrichuloj, malsanuloj, – kaj paralele shi chiam havis tempon kaj energion por preghado, kontemplado, meditado. **Fakte tiu „ORA" parto (la preghado, kontemplado) estas la fonto de chiu harmonia aktivado.**

Ekzistas „moderna proverbo" en nia lando: *„Kiu laboras, ne havas tempon enspezi monon."* Anstataú honesta laboro multaj serchas vojon de pli facila vivo, kaj ofte entreprenas ech eksterleghajn aferojn por richighi. Ghuste pro tiaj spertoj la juna kaj energia kristana chefministro de Hungario (inter 1998-2002) forte emfazis en sia programo: **„Honoron al la honesta laboro!"** Nia generacio ja devas pli kaj pli kompreni, ke ne sufichas financa stabiligo, ne sufichas lerta ekonomia „shakludado": chiu prospero, chiu bonstato, chiu kulturo bazighas sur honesta, konscia laboro. Kaj por tio la socio nepre bezonas moralajn, etikajn fundamentojn. Se tiu sana klopodo: laboremo, diligento trovighas en la socio, chiam restas espero – ech post detrua milito! Oni pripensu, kiel rapide Eúropo rekonstruighis el la ruinoj post la dua mondmilito. Se tio tamen mankas, ech dum paco nur stagnas la vivo; korupto, profitavido, egoismo blokas chion.

Do, ni rajte kaj juste estimas la homojn diligentajn, fidindajn, laboremajn. Ni alte taksas la laboron de virinoj kaj viroj, kiuj aktivadas en la familio, en la socio, en la eklezio; kiuj sinofere zorgas pri la sano de infanoj kaj maljunuloj, kiuj kreas valorojn por la bono de la tuta komunumo. Des pli ni konsternighas – kelkaj eble ech perpleksighas – pro la vortoj de Jesuo

jhus aúditaj en la evangelio: *„Marta, Marta, vi zorgas kaj klopodas pri multaj aferoj; sed unu afero estas necesa; kaj Maria elektis la bonan parton."* Kiu nur suprajhe aúskultas la evangelion, eble ekhavos la impreson: Jesuo konsilas al ni vivi sole el la vorto de Dio. Tio efikas des pli mirige, ech indignige, char Jesuo mem apogis sin je la helpo kaj servo de Marta – kaj aliaj „Martaj" diligentemaj; kaj li tre volonte akceptis invitojn al festenoj.

Antaú ol ni miskomprenus kaj misinterpretus la vortojn de Jesuo, ni devas konstati: la hodiaúa evangelia perikopo ne volas sugesti ian spiritualan sinforturnon de la mondaj zorgoj, neglekton al la bezonoj de la korpo, devalvadon de laboro, diligentado, honestaj homaj klopodoj. Temas pri io tute alia. La vera senco kaj esenco de lia instruo estas **la ghusta hierarkio de la valoroj.** Oni povus citi multajn aliajn dirajhojn de la Majstro, kiuj konfirmas tiun chi starpunkton: *„Celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj chio tio estos aldonita al vi." (Mt 6,33)* – Aú aliloke: *„Ne per la pano sole vivas homo, sed per chiu vorto, kiu eliras el la busho de Dio." (Mt 4,4)* Jesuo bone sciis, ke sur la tero ne sufichas nur la vortoj de Dio, sed por subteni sin oni bezonas ankaú panon. Li ja mem satigis tiujn, kiuj aúskultadis liajn vortojn.

En nia epoko la evoluo de l' scienco kaj tekniko produktis mirindajn rezultojn, tamen la morala, la etika evoluo de l' homo ne kun la sama rapideco progresas. Malgraú la relativa bonstato multaj elrevighis el la vivo. **La materiala richeco ofte kashas animan malrichecon, ech mizerecon.** Ni pensas kaj zorgas pri chio, pri chio fakte akcesora, kaj ni tamen forgesas pri tiu „unu sola necesa" afero. La vera ghojo, la felicho kaj efektiva bonstato, la gajeco kaj libereco de la koro estas rezulto kaj frukto de la Evangelio: Dia donaco, kiun oni ne povas produkti ech per plej granda klopodo kaj fortostrecho. *„Maria elektis la bonan parton",* char tio, kion shi atendis de Jesuo, nenie aliloke estas trovebla kaj akirebla, nur che li. Ghi restas por chiam donaco. Lia donaco.

Gefratoj! Ankaú ni povas vivi honeste, povas klopodi, diligentadi, povas atingi eminentajn rezultojn, sed trovi la „unu solan kaj necesan", trovi la esencon de l' vivo, trovi la felichon – ni povas nur che Jesuo Kristo. **Char ni vane klopodas, karaj, vane diligentas, vane ni atingas rezultojn, tiu esenco, tiu felicho estas kaj restas chiam donaco.** Donaco de la Evangelio. Donaco de Jesuo Kristo. Donaco de Dio.

(Fragmento el la libro A katedrális küszöbén)